


La kuba varianto de la hispana lingvo



Kiel sciante, la hispana lingvo estis altrudita de la hispanoj en la plejparto de la amerika kontinento kaj kun la tempopaso naskiĝis la tiel nomata varianto de la amerika hispana lingvo kies trajtoj diferencigas ĝin de la normoj uzataj en Hispanio.

Laŭlonge de la tempo pli kaj pli firmiĝas la konscio ke en la hispana lingvo de Kubo estas markitaj influoj de la aborigenaj lingvoj, kune kun la afrikaj lingvoj el la diversaj etnaj grupoj kiel sklavo venigitaj al la insulo dum la hispana koloniado; same evidentas ke estante insulo, la unueciga lingvo, kun ties antecedantoj andaluza, kanaria kaj kastilia, posedas proprajn trajtojn.

La aborigena heredaĵo.

La aborigena kulturo kaj specife la lingva influo troveblas en la nuna lingvo parolata en Kubo, aparte en la formo de parolesprimoj uzitaj de la aborigenaj grupoj inter kiuj regis la aruaka lingvo (lingvo parolata de la aborigenaj praloĝantoj).

En kelkaj lokoj de la insula geografio sentebblas tia influo pli aŭ malpli forte, dum en aliaj regionoj ĝi restas en la toponimoj, tio estas, en la nomoj de urboj, vilaĝoj aŭ geografiaj estaĵoj.

Ekzemple kiam ni parolas pri la nomo de nia insularo Kubo (Cuba) kelkaj aŭtoroj emfazas ke ĝi devenas el tiu fonto unua, kaj la vorto signifas, "verdo, interno", sendube pro la naturaj trajtoj de la loko mem.

Tamen, signifa klarigo estas donita de la kubano Juan José Arrom kiam li esprimas ke la aŭtoro C.H. de Goeje [The Arawack language of Guiana, Amsterdam, 1928] registras en Surinamo la voĉon "dakuba" (mia kampo, mia tereno), kaj el antaŭaj esploroj li asertas ke la grafioj "a-kuba, akúba" kaj "u-kuba", enhavas la sencon "grundo, kampo, tereno".

En tiuj ĉi transkriboj, la aŭtoro Goeje klarigas ke la komenca voĉo a-, u- ne apartenas al la radiko, sed temas pri prefikso kiu anoncas la ĝeneralan karakteron de la vorto, kaj tial ĉi apartigas per streko la prefikson de la radiko.

La vortoj Koba aŭ Kuba verŝajne estis la voĉo kiun Kristoforo Kolumbo devintus aŭdi kaj tial povus esti klarigita lia hezitemo rilate la registriĝon, malfermante aŭ tranĉante la vokalon de la unua silabo, kiel Colba kaj poste kiel Cuba.

Elstaras aliaj vortoj kun lingva aborigena influo, inter ili, ekzemple, la tre uzataj: ceiba (ceibo), tabaco (tabako), canoa (kanuo), huracán (uragano), bohío (palmodomo), Baracoa (Barakoa) kaj multaj aliaj.

La verko de la kuba sciencisto kaj filologo Sergio Valdés Bernal klasigas 180 aruakismojn rilatajn al la flaĝro, 103 al la faĝno, 46 al la materia kulturo, 3 rilataj al la spirita kulturo, 19 ligitaj al ĉirkaŭaĉo, 4 al la socia organiza formo kaj aliaj 20 kiujn li taksas ceteraĉoj, tio estas, 371 vortoj kiuj apartenas al la lingva aborigena heredaĉo.

La afrika heredaĉo.

Ĉi esprimiĝas esence per la araba flanko danke al la elmigrantaro kiu atingis la insulon. Pli ol 4 mil voĉoj el araba deveno uzatas en la leksiko de nia lingvo, inter ili estas la vortoj aldea (vilaĉo), alcaldía (urbestraro), arrabal (kamparo), alcohol (alkoholo), almohada (kapkuseno) kaj aliaj.

Ankaŭ el la sudsaharaj lingvoj, kvamkam malpli, evidentiĝas influoj en la hispana lingvo, kiuj estis heredigitaj el la biologia kaj kultura miksado okazinta en la insulo.

La sklavoj venigitaj al Kubo flanke de la koloniistoj apartenis al diversaj afrikaj etnoj, ĝenerale el la okcidenta parto de la kontinento, ekzemple el Niĝerio, kaj unu el la plej gravaj etnoj kiuj kunfluis en la kuba kulturo estis la grupoj kwa, joruba kaj lukumio.

Unu el la plej prestiĝaj intelektuloj kiuj okupiĝis pri tiuj studoj en Kubo estas Miguel Barnet kiu esprimis ke la kulturo joruba estas vitala por la naskiĝo de transkulturitaj esprimoj, laŭ la termino kreita de la elstara etnologo, lingvisto, sociologo, juristo kaj antropologo, la doktoro Fernando Ortiz.

Barnet, disĉiplo de doktoro Ortiz, esprimis ke la joruba mitologio, komparebla al la greka en la filozofia riĝeco kaj poezia valoro, estas la nura solida korpuso de ideoj pri la kreado de la mondo kiun nia lando povas oferi kiel trezoro de la tradicia popola kulturo.

Al la neformala lingvo aŭ al la hispana lingvo ĝenerale transiris kelkaj vortoj el la joruba kulturo kiel ekzemple, orisha (oriĉo) kaj aliaj uzataj por nomi la diojn de ilia religia panteono.

Aliaj grupoj ankaŭ influis la hispanan lingvon, menciendas la grupo efik kies lingvo estas ligitaj al funkciado en Kubo de iaspeca sekreta societo konata kiel Abacú (prononci abakĉao).

Ankaŭ la grupo bantua konsiderata kiel la plej grava afrika heredaĉo en la kariba regiono, la plej antikva, subtila kaj nerekonsebla pro tio ke ĉi estas la plej familiara.

Influnivelo de la afrika heredaĉo en la hispana lingvo de Kubo.

Laŭ opinio de diversaj esploristoj neniu el la liturgiaj lingvoj afrikaj posedis la koherecigan forton por opozicii en la pasinteco al la hispana lingvo, aŭ al la kastilia, tiam la oficiala lingvo de la regantaj klasoj.

En la semantika kampo la pruntedono de la afrikaj lingvoj evidentiĝas en la riĝeco rilate la signifon de kelkaj vortoj kaj esprimoj, sed en la leksika kampo multe pli videblas la spuroj de la sudsaharaj pruntedonoj en la kulta formala lingvo kaj eĉ en la popola.

Fakte, estas en la leksika kampo kie kuĉas la ĝefa heredaĉo de la afrikaj lingvoj, tial ke la negroj portitaj al la insulo estis transkulturitaj kaj pro tio ili iĝis parto nedisigebla de la kuba naciĉo kaj ne fariĝis

etnokultura minoritato.

Tio signifas ke ili partoprenis en la formado de nova identeco, la kuba identeco kaj tial, naski?inte en la insulo ili, samkiel la devenintoj de aliaj kulturoj, neniam eksentis sin parto de disaj etnoj, sed parto de nova nacio kiu formi?is meze de la 18-a jarcento, tio estas la kuba nacieco.

<https://www.radiohc.cu/index.php/eo/especiales/exclusivas/234907-la-kuba-variante-de-la-hispana-lingvo>



Radio Habana Cuba